

BULTENO

DE ESPERANTISTA KLUBO

EN PRAHA • Fondita en 1902

LOKA GRUPO DE ĈEA

2-a numero

junio-decemhro 1973

Motto:

Kdybyste se esperantu naučili, aniž byste ho využili ve svůj prospěch, ať duševní nebo hmotný, mařili byste učením čas. Nikdo není tak učený, aby mohl přezíratí přednosti esperanta, a nikdo není tak nevědomý, aby nemohl z něho těžiti k svému prospěchu.

A. Slanina

P A S I V E C O D E E S P E R A N T I S T O J

Ĉiu hohio, ĉiu idealo kostas monon. Sen mono (subteno) oni povas fari nenion. Kaj mi venas al interega sperto: esperantistoj ĉiam plendas pri altaj kotizoj al klubo aŭ al Internacia organizaĵo, kvankam Esperanto meritas subtenon pro sia kultura valoro.

Ni nur bone kalkulu: kiom oni oferas por diversaj, eĉ dubindaj "kulturspektakloj" aŭ hobiaj (kartludoj, tabako, alkoholo, lotumo, kolektado de diversaj sensencaĵoj ktp.), kiuj kostas pli multe ol modesta Esperanto! (Modesta tial, ĉar ĝi ne havas rimedojn por esti "malmodesta").

Kial ni ne havas bonan, presitan gazeton? Mankas bonaj abonantoj, mankas kuraĝaj homoj, kiuj defendus nian postulon per kulturaj argumentoj: "Ni estas lingva societo, ni bezonas gazeton same kiel futbalistoj bezonas pilkon." (Sed futbalistoj havas kaj pilkon kaj gazeton.) Oni venas al konkludo, ĉu ne estus pli bone fondi Esperantistan futbalan klulon; eble tiam ni ricevus kaj klubejon kaj gazeton!

Sed ĝis tiam ni pagu nian kotizon kaj ne grumblu, ĉar per tio ni povus sufoki eĉ modestan Esperanton!

A. Slanina

K u n s e n t e m o

Vidante suferanton mi
eksentas treegan doloron
Kaj pike la son' de fremda vekri'
penetras en mian koron.

Preferus mi en tia moment'
por fremdaj malbonon toleri –
plibonas ja ĝemi mem en turment',
ol vidi aliajn suferi.

H. Weinhengst

R i n g o

Ĉion mi lasos
tie ĉi: figarbon,
globuson, mian
mirindan mansardon...

Mi turnas ĝin kaj
al mi bild' aperas.
Kiel mi ĝojas,
Kiel mi suferas!

Kaj mi kunprenos
sole unu ringon.
Kiu ĝin ŝovis
sur la ringofingron?

Ĉiam alia
bild' kaj ĉiam sama
vizaĝ' Ĉu tiu
de amant' iama?

Kial ĝi iĝis
al mi tiel kara?
Ho, ĝi ne estas
ringo ordirara!

Kaj iu ploros
kaj mi jam survoje
turnos la ringon,
kun ridet', lastfoje ...

Eli Urbanová

Kluba vivo

Programoj de la klubaj vesperoj

oktobro

- | | | |
|-----|-----------|--|
| 3. | Ondráček | Kelkaj problemoj de produktado de elektro-energio |
| 8. | Kynčl | Ĉu la korespondado estas ĉiam interesa? |
| 15. | Hejnová | Rememoroj |
| 22. | Dr. Nývlt | La humoristo ne mortas...
(rememoro al R. Schwartz) |
| 29. | - | Amika renkontiĝo - informoj |

novembro

- | | | |
|-----|--------------|--|
| 5. | Dr. Horský | La sepa kontinento |
| 12. | Dr. Horský | Lumbildoj el Dalmacio |
| 19. | Eli Urbanová | Ili estu homoj (esp. pri sia ĉeĥa verko) |
| 26. | - | Amika renkontiĝo - informoj |

decembro

- | | | |
|-----|-------------------------------|--------------------------------|
| 3. | J. Hošek | Pri plej granda Moravianino |
| 10. | Junularo
kaj Nývlt-Slanina | Nikolaa vespero |
| 17. | | Zamerhofa vespero |
| 24. | | Libera tempo |
| 31. | | Silvestron oni festas hejme!!! |

Pokladní zpráva

V posledním letošním vydání Starta č. 5 vyzývá Český esperantský svaz všechny přihlášené místní skupiny a ostatní kluby nebo kroužky o inkasování členských příspěvků již v tomto čtvrtletí tak, aby byly poukázány svazu nejdéle do konce prosince t.r. Tím získá svaz již počátkem roku 1974 přehled o stavu členstva, aby mohl lépe plánovat náklad Starta, protože bude mít k dispozici prostředky již počátkem roku, bude operativnější při jednáních kde je třeba přehledu o stavu členstva, a jeho složení a tím lépe realizovat naše společné cíle a služby pro nás všechny.

Klub esperantistů v Praze-místní skupina ČES sděluje svým členům, jak již bylo oznámeno v našem letošním prvním čísle Bultena, že členské příspěvky na rok 1974 zůstávají nezměněny a platí tyto směrnice:

Kategorie	A	výdělečně činní a důchodci s příjmem	Kčs 1000,- a více	Kčs 68,-
	B	důchodci, s příjmem pod studující bez vlastního příjmu	Kčs 1000,-	" 44,- " 34,-
	C	podporující členové svazu - nejméně		" 100,-
	D	rodinní příslušníci a		
	E	příspěvající členové bez nároku na Starto		" 20,-

Nově se hlásící členové platí Kčs 10,- navíc jako jednorázové zápisné na legitimaci svazu. Podotýkáme, že každý člen klubu musí být i členem svazu.

V členském příspěvku kategorií A, B, C, je zahrnuto předplatné na svazový časopis Starto. S politováním konstatujeme, že mnozí naši členové dosud nezaplatili svůj členský příspěvek za letošní rok i za léta předešlá a složenky jim zasláné nechali bez povšimnutí.

Do tohoto čísla Bultena přikládáme složenky jednak pro placení čl. příspěvků na rok 1974, pokud se tak již nestalo zaplacením v klubu osobně, jednak dlužícím členům za rok 1973, které zároveň žádáme, aby svoji povinnost splnili do konce t. r. Žádáme ty, kteří už nemají o další členství zájem, aby nám alespoň vrátili Bulteno s poznámkou: "N e p ř i j í m á m".

Rádi bychom měli pořádek v členské kartotéce i přehled o našich věrných. Členech a příznivcích, proto opět důrazně žádáme, aby tak učinili nejdéle do konce tohoto roku a tím nám ušetřili práci. Připomínáme ještě, že členové, kteří nemohou zaplatit Kčs 68,- (roční příspěvek) a nemají zájem dostávat Starto, mohou zaplatit jen Kčs 30,-; nově se hlasivší do svazu o Kčs 10,- navíc.

Anna Bárochová, pokladní klubu.

Ni gratulas al s-ano Tomáš Balda!

EKP esprimas siajn elkorajn gratulojn kaj bondezirojn al Tomáš Balda, ĉefsekretario de MEM, okaze de lia honorigo per insigno kaj diplomo ĉe la 20-a jubileo de MEM en Beogrado. Tiu ĉi festa honorigo estas inda aprezo de la longjara aktiveco de s. T. Balda en la porpaca strebado kaj oferejo.

En aŭgusto 1973 ĝisvivis 75 jarojn František Slavík en Praha, ĝis 1946 oferema laboranta honorofica sekretario de EAĈSR, kiu havis ĉe li (Uralské nám.) sian sidejon. Gratuloj kaj bonan sanon!

Propono

Ne estas sekreto, ke nia programestro staras ofte antaŭ malfacile solvebla tasko, kiam li devas kompili program-liston por niaj ĉiusemajnaj kunvenoj. Mankas kompetentaj kontribuantoj, mankas taŭgaj temoj. Sekve, ne malofte niaj programoj estas – permesu al mi sklaveoan tradukon de konata ĉeĥa diraĵo – kvazaŭ "kudritaj per varma kudrilo."

Aliflanke ankaŭ ne estas sekreto, ke la lingvonivelo de multaj fidelaj kaj regulaj vizitantoj de niaj kunvenoj estas nepre plibonigenda. Kaj jen estas kerno de mia propono. Ekzistas ebleco per unu bato forigi ambaŭ supre montritajn mankojn.

Multaj el niaj geklubanoj posedas bonegan legolibron por progresintoj de W.Auld: "Paŝoj al plena posedo". Mi estas certa, ke plej ofte tiu legolibro senutile kuŝas ie en libroŝranko pro tiu simpla kaŭzo, ke la posedanto ne kapablas memstare, sen gvido de sperta instruanto, trastudi la libron kaj tiel tiri el ĝi plenan profiton por sia lingvoscio. Nur supraĵa tralego de la lerolibro tute preterpasas la atendeblajn rezultojn.

Miaopinie estus prudente dufoje en la monato dediĉi unu horon en la kadro de niaj kunveroj al kolektiva studado de la legolibro sub gvido de lerta instruanto. Certe tio estus grava helpo por niaj lingve ankoraŭ nematuraj membroj kaj eĉ por la jam lingve sperttaj, tiel uzita tempo, ne estos tute sen utilo. Mi ne dubas, ke iu el niaj membroj, sperta en la kursgvidado, volonte prenos sur sin la taskon gvidi tiun ĉi kolektivitan studadon, se inter la membraro montriĝos por tio serioza intereso. Ia ebleco, ĝenerale levi la lingvonivelon de nia membraro, certe pravigus la eksperimenton.

Ankoraŭ kelkajn vortojn pri niaj programoj. Ni estu sinceraj: tiuj, bedaŭrinde tro oftaj "lumbild-paroladoj" kun komentarioj malzorge aŭ tute antaŭe ne preparitaj, ofte eĉ en fuŝa Esperanto, ĉu tion ni rajtas nomi "altnivela programo?" Kiomfoje jam venis al mi la penso, ke estus multe pli prudente resti hejme kaj utiligi la tempon per legado de iu bona Esperanta libro! Ni, malnovaj membroj, fariĝis iel tro modestaj kaj paciĝi kun la malalta nivelo de niaj programoj. Sed ni devas pensi ankaŭ pri la ceteraj, kiuj plenrajte atendas, ke la vizito al niaj kunvenoj ne estos vana perdo de tempo. Kiom da novaj adeptoj, post la fino de kurso, regule vizitas niajn kunvenojn? Kelkfoje ili venas kaj poste tute malaperas el nia vivo. Tio ne estas senmotiva! Verŝajne ili ne trovis inter ni tion, kion ili atendis. Ĉu estas nur ilia kulpo? Nepre pripensinde.

zm

Kaj la realo?

(sonĝo de nia bibliotekisto)

Merkreda antaŭvespero. Rigardo al mia horloĝo informis min, ke pasis jam kvar minutoj post la sesa. Aŭtomate plirapidiĝis miaj paŝoj kaj enirinte la bibliotekon mi ekvidis kutiman scenon: en la ejo svarmis ĉirkaŭ dekkvar personoj, plejparte konataj vizaĝoj de niaj klubanoj. Mia kunlaborantino, kiu estas pli akurata ol mi, jam priservis la unuajn klientojn. Surplanke stapliĝis bela amaso de redonitaj libroj, en la spaco kaosis voĉoj de interparolantoj, kelkaj personoj marŝis de unu ŝranko al la alia, elektante por si novan legaĵon kaj la vicbibliotekistino faris notojn pri la novepruntitaj libroj. Mi tuj eklaboris.

"Ĉu vi povas rekomendi al mi ion facilan?" albalbutis min timeme iu fraŭlino. "Mi ĵus finis la bazan kurson," aldonis ŝi klarige. Post kelkaj minutoj mi jam enmanigis al ŝi sveltan legolibron, dirante: "Por la unua fojo tio sufiĉas. Nur persistu, baldaŭ vi kapablos frandi eĉ la plej ampleksajn romanojn en Esperanto. Ĝis la revido kaj fartu bone!"

El la malantaŭo de la ejo eksonis voĉo de iu samideano. "Hieraŭ mi legis en Heroldo, ke aperis nova romano de Schwartz, ĉu vi havas ĝin?" – "Certe, ĝuste antaŭhieraŭ Régulo Pérez mem per speciala aviadilo liveris ĝin por nia biblioteko" mokis mi. "Homo, vi estas naiva, ĉu vi kredas, ke estas tiel facile akiri novajn librojn el eksterlando?" Sed tuj mi ekafablis: "Tamen, ne malĝoju! Eĉ sen tio vi trovos en la biblioteko interesan letaĵon, kiu plene kontentigos vin. Teo Jung, Jean

Forge, Julio Baghy, Stellan Engholm, Baldur Ragnarsson, Emba, William Auld, Poul Thorsen, Cezaro Rossetti, Reto Rossetti" – senelekte mi ŝutis sur lian kapon nomojn de naj konataj originalaj verkistoj. "Jen la listo de originala literaturo – prozo, poezio – laŭ via plaĉo. Bonvolu mem elekti."

Priservitaj klientoj laŭvice forlasis la ejon, dum novaj kaj novaj legemuloj enfluadis ĝin. "Tro malvasta la pordo," enpense mi ĝemetis. Ĝojinde jam videbliĝis vakuo en la libroŝrankoj – jen pruvo, kiom leg-avidaj estas niaj geklubanoj! Plejparte estas petata beletro, originala kaj tradukita. Sed estas ankaŭ personoj, kiujn ne kontentigas ilia ĝis nun akirita lingvonivelo, kaj tiuj volonte elektas librojn el la fako de lingva teorio. Kelkaj irteresiĝas pri faka literaturo, aliaj preferas malnovajn jarkolektojn de Esperantaj gazetoj, kiuj ofte entenas verajn gemojn de originala kaj tradukita literaturo. Teatraĵoj, religia literaturo, fakaj terminaroj, interlingvistiko – jen nur kelkaj fakoj de nia biblioteko.

La gustoj de la homoj varias kaj ni povas esti fieraj, ke nia biblioteko kapablas kontentigi ilin ĉiujn. Aŭ almenaŭ preskaŭ ĉiujn. Venis ekzemple iu samideano kun jena demando: "Ĉu ekzistas faka terminaro de insultoj en Esperanto?" – "Jes", prete mi respondas, "ĝi ekzistas. Sed ni ankoraŭ ne sukcesis akiri ĝin por nia biblioteko. Se vi tamen intencas insulti min, trankvile faru tion nacilingve. Mi jam al kutimiĝis."

Fine la lasta kliento forlasis la ejon. La vicbibliotekistino komencis la enŝrankigon de la redonitaj libroj, mi faras la lastajn notojn. Kvardek tri personoj hodiaŭ, cent tridek ses pruntitaj libroj – certe bela rezulto.

"Estis ŝvitige hodiaŭ, ĉu?" adresis mi al mia kunlaborantino, laca mi sidiĝis sur la seĝon kaj fermis la okulojn. Sed nur por mallonga momento. Subite frapis min akra lumo. Larĝe mi malfermis la okulojn. Sekvis kelkminuta konfuzo antaŭ ol mi kapablis konstati, ke mi kuŝas sur mia lito, dum ekstere estas jam hela tago.

"Kio, do," – konsternite mi balbutis. "Ĉu mi ne estas en la biblioteko? Ĉu ĉio estis nur sonĝo?" – Jes, estis nur sonĝo. Vere bela sonĝo, sed – NUR SONĜO! Kaj la realo ...?

zm

Redakcio dankas al samideano Ŝercl pro lia senpredenta laboro. Li ne fanfaronas, sed laboras.

Nekrologo

La 2-an de septembro 1973 forpasis 93jara malnova esperantisto, MUDr. Josef Fousek, advokato en Přelouč. Li naskiĝis la 9-an de aŭgusto 1881 en vilaĝo Hostín apud Beroun. En jaro 1907 li fariĝis doktoro de juro kaj samtempe li ellernis Esperanton. Jam en 1908 li gvidis E-kurson de 60 partoprenintoj. Kiel kandidato de advokateco li praktikadis en Pardubice, kie li konatiĝis kun E-poeto Dro Stanislav Schulhof, dentkuracisto.

Li kunlaboris kun dr. Tomáš Pumpr kaj sam. Slanina en "Verda Stacio" en Praha, tradukante aŭ muzikajn akcentojn kontrolante en operoj: Prodaná nevěsta de B. Smetana, V studni de V. Blodek, Rusalka de Ant. Dvořák. Kiel delegito de UEA li oficis en Přelouč. Ni, esperantistoj, perdis fervoran, bonaniman samideanon. Ni memoru lin!

- Sciipoj -

Polaj geologoj en Praha.

La 13-an de septembro alvojaĝis al Praha grupo de 23 polaj geologoj, apartenantaj al Rondo de esperantistoj ĉe Geologia Instituto en Varsovio. La rondo estas fondita de post aprilo pasintjara sub la gvidado de d-ro Sylwester Skompski; ĝi estas en vigla kontakto kun plurlandaj geologoj, precipe kun Geologia Sekcio de ISAE.

En la ĉefa stacidomo de Praha bonvenivis la gekolegojn s-ano RNDr. Josef. Kavka, CSc., la ĝenerala sekretario de ISAE kaj la sekretario de GS-ISAE. La grupo dividiĝis en du partojn: la pli granda (14 personoj) senprokraste daŭrigis vojaĝi Budapeŝton, la malpli grandan (8 koleginojn kun d-ro Skompski) d-ro Kavka akompanis en la hotelon Central. La tagon li utiligis por montri al ili Malnovan Urbon, Kastelon kun la katedralo de Sankta Vito kaj en Malgranda Urbo la templon de la sankta Nikolao. Geologian parton de la ekskurso reprezentis la posttagmeza vizito de la kanjono, kiun estas eroziinta dum kvaternaro la rivereto Šárka en la malmolaj liditoj de algonkia aĝo. Forlasinte la pitoreskan kanjonon, la geologoj vidis ankoraŭ la tavolaron de aĝo ordovicia (alternon de kvarcitaj benkoj kun ardezaj intertavoletoj).

Dum la renkontiĝo d-roj Kavka kaj Skompski havis bonan okazon pritrakti detalojn de la planata scienca simpozio INTEPNACIA LINGVO KAJ GEOLOGIO. La simpozio okazos en Varsovio maje venontjare; ĝia celo estos konatigi diverslandajn geologojn kun la ĝisnunaj atingoj de Esperanto sur la kampo de geologiaj sciencoj, ebligi al la partoprenantoj prelegadon en Eo kaj fari pluajn gravajn paŝojn por oficialigo de Eo en la geologiaj sferoj. La simpozion organizos GS-ISAE sub la personaj aŭspicioj de prof. Roman Osika, la direktoro de Geologia Instituto en Varsovio. Oni prelegos en du lingvoj, nome en Eo kaj – por multnombre partoprenigi polajn geologojn – ankaŭ en la lingvo pola. La prelegoj estos publikigitaj libroforme, en la 3-a volumo de GEOLOGIO INTERNACIA (1976), periodaĵo aŭspiciata de CS-ISAE kaj eldonata de GEOINDUSTRIA, n.e. en Praha.

Sekvatage la polaj geologoj vizitis la geologian ekspozicion de Nacia Muzeo en Praha, sub la plej kompetenta gvido de s-ano RNDr. Vlastislav Zázvorka, CSc., tiea direktoro kaj samtempe la prezidanto de GS-ISAE.

Post la tagmanĝo la karaj gastoj forvojaĝis Budapeŝton, por akceptiĝi tie de s-ano d-ro Endre Dudich, la ĉefo de Informa Sekcio de Hungara Geologia Instituto. Revenvoje ili planis ankoraŭ vizitojn de Brno kaj Ostrava.

RNDr. Josef Kavka

-X-X-X-X-

EBLE INTERESOS VIN, ke en Libeň estos instruata Esperanto al junularo de ZDŠ en Lindnerova strato (proksime de la krucvojo U Kříže), la kurson, kiu okazos ĉiumarde de la 17a – 18-a horo, gvidos Eli Urbanová, kiu tiamaniere kompletigis sian laborhoraron.

-X-X-X-X-

EN LASTA MOMENTO la redakcio ricevis sciigon, ke la 9-an de oktobro forpasis s-ano Antonín Seemann, aktoro kaj membro de iama Verda Ĉaro de Julio Baghy. (Verda Ĉaro estis teatra sekcio de EKP).

- Interesajoj -

SOMERA ESPERANTO-KOLEGIO en Liberec okazis de la 1-a – 15-a de septemhro. Partoprenis 26 personoj – 15 ĉeĥoj, la aliaj el GDR. Oni instruis laŭ rekta metodo INTER. Grandan intereson vekis ankaŭ retorikaj lecionoj de Ant. Slanina. Precipe germanaj samideanoj estis tre kontentaj, kaj promesis reveni venontjare.

-X-X-X-X-

EK-LIBEREC aranĝis la 5-an – 7-an de oktobro 1973 junulara seminarion en Černá Louže apud Rynoltice. Partoprenis 35 gejunuloj. S-ano Václav Vitek parolis pri TEJO kongreso en Sarajevo, ankaŭ pri Tutmonda Junulara Festivalo en Berlino. Prelegon pri societa konduto kaj provlecionon de rekta lingva, instruado faris s-ano Ant. Slanina. Pri Esp.-historio prelegis s-ano Špína. En artisma programo recitis s-ino Eva Seemannová poemojn de Šrámek, Puŝkin k.a. Partoprenintoj estis tre kontentaj.

-X-X-X-X-

KOLEKTANTOJ DE INSIGNOJ, skribu al EK Hodonín. Petu detalajn informojn de Vl. Hasala, S.K.N. 37, 695 03 Hodonín. Li estas sekretario de la sekcio (prezidanto estas Dolfa Bartošík, Praha), kaj samtempe redaktas specialan Bultenon, por insigno-kolektantoj.

– Lingva angulo –

Antonín Slanina.

L a a k u z a t i v o

kiel kaj kiam oni uzas la akuzativon:

1/ Rekta objekto (komplemento) en propozicio kun transitiva verbo:

Jozefo aĉetas libron . . . /kion?/

Ŝi skribas leteron /kion?/

2/ Montras direkton: Petro iras en urbon . . . /kien?/

Karlo metas libron sur fenestron . . . /kien?/

3/ Dato: La kunveno estos la 3-an de majo . . /kiam?/

Praha , la 1-an de marto 1973 /kiam? – ĉe letero/

4/ Meruro, pezo, prezo: La libro kostas dudek kronojn . . . /kiom?/

La sukero en sako pezas 60 kilogramojn. /kiom?/

La vojo estas longa 200 kilometrojn /kiom?/.

5/ Daŭro de ago: Dormi tutan nokton.

La laboro daŭros ankoraŭ tri monatojn.

6/ Anstataŭas prepozicion: Mi atendas vin /anstataŭ: mi atendas je vi/,

Helpu lin: /anstataŭ: helpu al li!/

Demandu nur specialistojn /anstataŭ: demandu nur ĉe specialistoj/,

Kiam post la verbo sekvas diversaj objektoj kun diversaj signifoj, tiam diferencu:

Mi sendas leteron al Parizo /ne: Parizon!/

Li instruas min pri tio /ne: tion!/

Li instruis min /anstataŭ: al mi!.

Ti instruis tion /anstataŭ: pri tio!.

Kiam oni ne uzas la akuzativon:

Post ĉiuj prepozicioj sekvas nominativo, sed post kelkaj oni povas uzi akuzativon. Diferencu bone!

anstataŭ	Vi estos en kunveno anstataŭ mi. Vi anstataŭos min en la kunveno.	/anstataŭ kiu?/ /kiun?/
antaŭ	Instruisto staras antaŭ la tabulo. Iru antaŭ tabulon!	/kie?/ /kien?/
apud	Arbo staras apud domo. Venu apud min:	/kie?/ /kien?/
ĉirkaŭ	Ĉirkaŭ la vilaĝo staras arboj. Josefo vojaĝas ĉirkaŭ la mondon.	/kie?/ /kien?/
ekster	Karlo promenas ekster la domo. Jozefo iras ekster la urbon.	/kie?/ /kien?/
en	Li iras en ĝardeno. Li iras en ĝardenon.	/kie?/ /kien?/
inter	Inter Stokholmo kaj Praha estas granda distanco. Iru inter ilin kaj dancu!	/kie?/ /kien?/
kontraŭ	La urbodomo staras kontraŭ katedralo. Iru kontraŭ malamikon!	/kie?/ /kien?/
krom	En kunveno kro mi estis 20 homoj. Krom Karlon mi vidis Jozefon.	/krom kiu?/ /krom kiun?/
po	Patrino donis al infanoj po unu pomo. Donu al ili po tri pomojn.	/po kiom?/ /kion?/
post	La trajno veturos post unu horo. Venu post lin!	/post kiom?/ /post kiun?/
sub	La hundo kuŝas sub la tahlo. La hundo iras sub la tablon.	/kie?/ /kien?/
super	Lampo pendas super la tablo. Pendigu lampon super la tablon.	/kie?/ /kien?/
sur	Sur la tablo kuŝas libroj. Metu la librojn sur la tablon!	/kie?/ /kien?/
trans	Ili loĝas en la domo trans la rivero. La birdoj flugas trans la riveron.	/kie?/ /kien?/

- Kuiru internacie -

KUNIKLA SUPO (Britujo)

1 sovaĝa kuniklo	1 trunketo de petroselo
2 ŝalotoj	1 laŭra folio
2 karotoj	2 karfioloj
1 tomato	1½ l da akvo
1 trunketo de celerio	¼ l da elbolaĵo aŭ akvo
45 g da butero	pipro kaj salo
120 g da malgrasa lardo	2 supkulerroj da faruno

Senŝeligu kaj kubigu la ŝalotojn, karotojn kaj tomaton, purigu kaj haku la celerion. Lavu kaj pecigu la kuniklon. Fandu duonon de la butero en kaserolo, aldonu la kuniklajn pecojn kaj hakitan lardon, fritu ĝis bruneco. Enmetu la legomojn, fritu ĝis bruneco. Aldonu petroselon, laŭran folion, kariofilojn, akvon kaj elbolaĵon. Salu kaj pipru. Kuiretu dun 1 ½ horoj, senŝaŭmante de tempo al tempo. Kribru kaj kiam ĝi malvarmiĝas, forprenu la grason de la supo. En kaserolu fandu la alian duonon de la butero, fritu la farunon ĝis bruneco, aldonu iomete de la supo, kuiru ĝis glatiĝo, kirlante bone. Aldonu la reston de la supo kaj sufiĉe da kubigita kunikla viando por garni la supon.

KUNIKLO KUN SEKIGITAJ PRUNOJ (Belgujo)

1 kuniklo	½ l da ruĝa vino
360g da sekigitaj prunoj	2 ½ supkulerroj da vinagro
2 laŭraj folioj	kelkaj piprograjnoj
45 g da faruno	salo kaj pipro
60 g da butero	1 supkulero da konfitaĵo aŭ gelateno

Porcigu la kuniklon kaj trempadu tutnokte en la vino, vinagro kaj herboj. En alia pelvo trempadu la sekigitajn prunojn en malvarma akvo. La venontan tagon prenu la kuniklon el la likvaĵo, sekigu kaj fritu en la butero dum kelkaj minutoj. Prenu el la butero. En kaserolo fritu la farunon en la butero dum kelkaj minutoj, aldonu la kribritan vinan likvaĵon, kuiru, kirlante la tutan tempon ĝis la saŭco estas glata. Enmetu la kuniklon, salu kaj pipru kaj aldonu la bone kribritajn prunojn. Stufetu dum proksimume 1 ½ horoj aŭ ĝis la kuniklo estas tute mola. Enmiksi la konfitaĵon (prunan aŭ grosan) aŭ ruĝriban gelatenon (ruĝa riba gelateno estas la plej bongusta) antaŭ ol surtabligi.

LEPORO KUN CEPOJ (grekujo)

1 malgranda leporo pecigita	2 laŭraj folioj
1 kg da cepoj aŭ ŝalotoj	pinĉo da muskato kaj rosmareno
iomete da celerio	2 karotoj
iomete da ajlo	salo kaj pipro
240 g da lardgraso aŭ 60 g da oleo	vinagro
	akvo

Trempadu la leporon en vinagro dumnokte. Kribru bone. En fritilo fandu la grason kaj fritu la leporon. Metu en kaserolon, kovru per akvo kaj kuiretu dum 1 horo, salu kaj pipru. Intertempe pecetigu la celerion, karotojn kaj ajlon kaj fritetu ilin en la graso, en kiu la leporo estis fritita. Aldonu ĉiujn legomojn al la kaserolo kune kun laŭraj folioj, muskato kaj rosmareno. Stufetu ankoraŭ 30 minutojn. La leporo devus esti preta post 1 3/2 horoj. La leporo estus pli bongusta per la aldono de iomete da vinagro kaj 1 aŭ 2 tomatoj.

B o n a n a p e t i t o n !

